# *Raúl Castro ratifis la konstantan akompanon de Kubo al Venezuelo*




Karakaso, mar 6 (RHK) La historia gvidanto de la Kuba Revolucio, Raúl Castro, ratifis ?i-diman?e, ke la oma?o de Kubo kaj ?ia popolo al Hugo Chávez ?iam akompanos kaj sekvos lin.

En la fermo de la Monda Renkonti?o pri la Valideco de la Bolivaria Penso de la revolucia gvidanto, la generalo de Armeo de la kariba insulo emfazis, ke Chávez kaj liaj kunbatalantoj skuis nian kontinenton kaj efikis la nuntempan historion de nia Ameriko.

Raúl emfazis, ke ni estis markitaj de Chávez kaj atestantoj de la agresoj kaj la ekonomia milito por renversi la bolivaran procezon, sed anka?, li opiniis, ni atestis kun fiero, ke la venezuela popolo sciis defendi siajn konkerojn kaj ne seniluziigi ilin.

Li emfazis, ke ni anka? atestis la gvidadon de Nicolás Maduro por da?rigi la laboron de Chávez kaj lian kapablon rezisti kaj venki.

Li certigis, ke "Kubo estis kaj estos apud la venezuela popolo, apud Maduro kaj la civita-armea kuni?o de la bolivara kaj ?avista popolo".

En sia parolado, la Armegeneralo atentigis, ke unu el la fortoj de la gvidado de Chávez estis lia lojaleco al la principoj kaj devontigoj, kiujn li sentis, kaj certigis, ke li fiksas celojn, kiuj anka? montras al ni la vojon.

Li atentigis, ke la kuba popolo rapide identigis la kvalitojn de Chávez, lian karismon, simpation kaj la popola proksimeco, kaj kiam ?i eksciis pri lia malsano,  demandis pri sia stato, evoluo kaj kion fari.

La morto de Chávez, li diris, ka?zis profundan doloron en la kuba popolo, kaj la popoloj ne eraras kun siaj gvidantoj, li asertis.

Li rememoris, ke kelkajn tagojn post sia foriro, Fidel skribis kun impeto kaj doloro en unu el siaj Pripensoj, publikigita en la kuba gazetaro la 5-an de marto, "la plej bona amiko kiun la kuba popolo havis dum sia historio forpasis".

Raúl deklaris ke tre frue, ?efkomandanto Fidel vidis gvidanton en Chávez kaj anta?vidis lian politikan estontecon, kiam multaj ankora?  e? ne konis lin.

Chávez havis la saman revolucian impulson, kiu animas la Kuban Revolucion, la ideon de Fidel ke venko ekzistas tiel longe kiel ?i estas batalata; tio estis en lia ideologio, li atentigis.
Li emfazis, ke la koncepto, ke "jes ni povas", kvankam la defioj estas grandegaj, Chávez praktikis ?in ?iutage.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/315730-raul-castro-ratifis-la-konstantan-akompanon-de-kubo-al-venezuelo

**Radio Habana Cuba**